



Lernolibro

de

# ESPERANTA STENOGRAFIO

(Unuiga Sistemo Stolze-Schrey)

verkis

**Frederiko Schneeberger,**

pastro.

---

Ferdinand Hirt & Sohn  
Esperanto-Fako.

**GERMANUJO** — ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL, BERLIN S. 42.

**ANGLUJO** — „REVIEW of REVIEWS“, LONDON.

**DANUJO** — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, KJOBENHAVN.

**FRANCUJO** — HACHETTE et Cie, PARIS.

**HISPANUJO** — J. ESPASA, BARCELONA.

**ITALUJO** — RAFFAELLO GIUSTI, LIVORNO.

**POLUJO** — M. ARCT, WARSZAWA.

Jetzt: Verlag der  
Deutschen Esperanto-Buchhandlung

## ANTAŬPAROLO.

Ju pli disvastiĝas la lingvo internacia „Esperanto“, des pli ĝi bezonas simplan mallongan skribon por la sciencaj kaj komercaj interrilitoj; kun la stenografio estas eble mallongigi la skriban laboradon ĝis unu kvinono aŭ sesono. Tempo estas mono! Bezono do ŝpari monon, ŝparante tempon, estas pli-malpli ĉiuhoma. Kontentigi tiun bezonon hodiaŭ estas la ĉefa celo de stenografio, kaj ĉiuj plibonigoj kaj simpligoj, faritaj en la sistemoj, intencadas krei stenografion disvastigotan en ĉiuj homaj klasoj, tiel ĉe la scienculoj kiel ankaŭ en la komercistaro kaj lerneja gejunularo. Bona sistemo devas ankaŭ servi al la stenografia praktikisto por skribi la plej rapidajn paroladojn. Des pli ĝi kontentigos tiun ĉi postulon, ju pli ĝi estas simpla kaj ju pli la reguloj por la praktika mallongigado povas esti generale uzataj. Tial en la jaro 1897 naskiĝis nia sistemo, kiu de tiu tempo pruvadis nerefuteble sian bonegecon. Ĝi ne nur estas bela kaj simpla, sed ankaŭ tre kura kaj vere praktika stenografio.

Laŭfon'o (Svisujo), Januaro 1905.

Frederiko Schneeberger.

En Svisujo la „Lernolibro de Esperanta Stenografio“ estas ricevebla ĉe la aŭtoro kaj ĉe F. Schneeberger, eldonejo, librejo, Biel (Bienne), kie oni povas ricevi ĉiujn Esperantajn verkojn, kaj ĉe H. Bebie, eldonejo de l'Svisa Stenografia Societo en Wetzikon-Zürich. (Propagandaj kartoj: 100 ekz. por 1,50 fr.; propagandaj folioj: 100 ekz. por 1 fr. afranke.)

# Esperanta Stenografio

(Unuiga Sistemo Stolze-Schrey).

## UNUA LECIONO.

§ 1.

Konsonantoj g, b, v, l, m. Vortfiniĝoj -o, -oj; -a, -aj.









					Vortfiniĝoj				
g	b	v	l	m		-o	-oj	-a	-aj

La stenografio havas nur unu alfabeton; grandaj literoj ne ekzistas. Alteco de la signoj g, b, v, l, m, nomiĝas unu ŝtupo.

La simplaj signoj por -o, -oj, -a, -aj nur servas kiel vortfiniĝoj (se ne rezultas dusenco ili signifas ankaŭ -io, -ioj, -ia, -iaj).

§ 2.

Vokaloj e, a, ia (Apudmetado).

							
d	ed	ad	iad	gd	ged	gad	giad

La vokaloj estas signifataj simbole per la metado, interligado kaj dikigo de la sekvanta konsonanto.





# DUA LECIONO.

## § 5.

**Konsonantoj j, ĝ, ĵ, z, n, s, r. Finiĝoj -ojn, -iojn.**

							<b>Vort-</b>		
j	ĝ	ĵ	z	n	s	r	<b>finiĝoj</b>	-ojn	-iojn

La signoj por n, s, r, estas nur duonŝtupaj. La signoj por r estas skribata dekstren aŭ maldekstren.

rado rano derulo libro irado arbo arbo barbo barbaro

- r estas skribata: maldekstren:
1. en vortkomenco
  2. post prefiksoj
  3. post konsonantoj
  4. post vokaloj i, ie, aŭ, aj (eŭ, ej), kiel vortkomencaj.
- dekstren: post la aliaj vokaloj.

Ekzemploj: legu kaj kopiadu:

**Stenografu:** jam, jaro, jaŭdo, jen, jes, jodo, juga, ĝis, ĝoja, zorgojn, najloj, neĝas, nun, sama, nomo, ĝemas, zebro, saldo, sin, sed.

## § 6.

**Alligado de Silaboj kaj Signoj.**

diademo, regido, ridado, vidigis, idolo, ludado, ludilo, modulo

areno, eraro, iriso, urso, ornamo, moruso, barono

rado, rano, germana, ĝardeno, birdo, mordema, miriga, urogalo

Por alligi silabon aŭ signon al antaŭa, la pieda aŭ fina punkto de la lasta antaŭirinta signo markas la linion, de kie oni kalkulas la lokon de la posta signo: apude, alte aŭ malalte.

Ĉe alligo de duonŝtupaj aŭ plimalgrandaj signoj al la R dekstren skribita, la supra rando markas la linion; se sekvas unuŝtupa aŭ pli-granda signo, la linio por la alligo kaj metiĝo de signoj kuŝas sur la suba rando de l'R.

Ekzemploj: legu kaj skribadu:

**Stenografu:** ĵaluza, ĵaluzemajn, miljaroj, ĵasmeno, junulino, juvelojn, senĝena, ĝibulo, gvidilo, zibelo, nebulo, naĝadon, nunaĵo, saĝulo, salono, saĝego, bona regado, belajn regionojn, balzamado, severa, rulado, rubeno, ĝojego, ruzaĵo, rebrilo, regularo, aldono, nomaro, vidilo, bonaj vinberoj, salajro, bonodora, deziro; ĵurnalo, generalo, zorga, senzorgemajn virinojn, najbarajn domojn, nervdoloroj, germana raso, vergo, sardelo, vermo, verbojn, mian, miajn, nian, niajn, ilian iliajn.

## § 7.

**Mallongigoj aŭ Sigeloj.**

**Prefiksoj:**

**Vortoj:**

bo- ge- mal- la, de, de la, da, en, en la, estas, estis (de l')

estos, estus, havas, havis, havos, havus, inter, per, par, baldaŭ

La duaj formoj de la prefiksoj bo-, ge-, mal-, de-, estas nur uzataj antaŭ vokaloj.

Silaboj kaj vortoj ofte uzataj havas simplajn signojn t. e. estas skribataj mallongige. Tiuj-ĉi signoj nomiĝas: sigeloj.

Legajo.



- 2 4 . 2 C m , 2 h , 2 v 2 h , 2 m 2 l l  
 res . - 2 h , 2 h , 2 m 2 v 2 h , 2 l 2 m  
 2 l 2 v , 2 l 2 h 2 v , 2 l 2 h 2 l 2 h , 2 l 2 h  
 2 h , 2 h , 2 v 2 m 2 l 2 h , 2 h 2 h  
 2 l 2 v 2 h , 2 l 2 h 2 l 2 h 2 v , 2 h 2 h  
 2 h 2 m 2 h 2 l 2 h 2 v 2 h 2 h 2 h 2 h 2 h .

**Stenografi:** La arboj estas verdaj. La razilo estas ilo de la razado. La maljuna avino legas ĵurnalojn. Estas somero; nun la birdoj revenos en la ĝardenon. La junulinoj mangas belajn, bonegajn, verdajn legomojn. La varma vino estas malbona, la malvarmega biero malsana. En somero la vilaĝanoj laboremaj amas la bonajn vinojn, la urbanoj bonajn bierojn. La ordema junulo lavas la vizaĝon; la junulino havas belegajn manojn. La orajn juvelojn de la virino en la urba magazeno dezirus la vilaĝa junularo. La nebulo envolvis la migrulojn. La nevoj legas en la ĝardeno. La „Belga Sonorilo“ estas bonega ĵurnalo.

TRIA LECIONO.




§ 8.

Konsonantoj t, k, p, f, h, ĥ; c, ĉ, ŝ.

1.  2.   
 t k p f h ĥ c ĉ ŝ

Signoj t, k, p, f, h, ĥ estas duŝtupaj kaj staras kun la piedo sur la linio, ili estas alt-kaj malaltmetataj kiel unuŝtupaj signoj.

Signoj c, ĉ, ŝ estas duŝtupaj signoj kun suba buketo, normale la skriblinio meze trankruacas tiujn-ĉi signojn.

a.  b.  c.   
 cetera, ĉefo, ŝako, pacema, kaĉo, paŝado, eĉ, ĉiuj

En vortkomenco (a.), en vortmezo (b.) kaj en vortfino ĉe apudmetiĝo la signoj kun suba buketo staras normale je la linio; en vortfino ili perdas la buketon.

Ekzercajo: legu kaj kopiadu:

M h k v 2 m 2 h 2 l 2 h 2 v 2 h 2 l 2 h  
 2 h 2 v 2 h 2 l 2 h 2 v 2 h 2 l 2 h 2 v 2 h 2 l 2 h  
 2 h 2 v 2 h 2 l 2 h 2 v 2 h 2 l 2 h 2 v 2 h 2 l 2 h

**Skribu:** papavo, funebro, harpoj, parkedo, fasano, haladzo, pego, kurba, frago, pekvo, lupolo, hepato, faruno, hejme, kukumoj, pipo, hotelojn, hamako, figoj, kolosa, rubeno, karoto, napo, ŝelhava, rapo, figuraĵo, elpreso, malfavoraj, paŭzo, afrika, alkoholismo, komunaj difinoj, pesilego, amoniako, ĉampano, ĉarma, ŝnuro, pajlero, purpuraj ŝildoj, ĉarniro, hajlero, malŝatema, etaĝo, ĝis gaja revido, korajn salutojn, familio.

§ 9.

Altmetiĝo kaj malaltmetiĝo de la signoj c, ĉ, ŝ.

*ĉ* *ĉ* *ŝ* *ŝ*

fiŝo, riĉulo, riĉiĝo, ricevas

Ĉe altmetiĝo la signoj c, ĉ, ŝ supreniras tute sur la linion kaj ricevas plimalgrandan buketon por alligo de signoj; la linio restas en ĝia loko t. e. estas ĉe la piedo de l'signo.

a.

b.

*bu* *bu* *bu* *ma* *ma* *ma* *ŝer* *ŝer* *ŝer* *pu* *pu* *pu*

tuŝas, buŝelo, buĉis, marĉo, ŝerco, pulĉinelo

Ĉe malaltmetiĝo (a.) kaj post konsonantoj la subbuketaj signoj lokiĝas regule kaj la linio ĉiam meze trakrucas la signon.

Ekzercaĵo: legu kaj kopiadu:

*bu* *bu* *bu* *ma* *ma* *ma* *ŝer* *ŝer* *ŝer* *pu* *pu* *pu*

**Skribu:** buŝego, butiko, diboĉado, fascino, feliĉegeco, fiŝhoko, fiŝovoj kaŭcio, kaŭĉuko, kirŝo, koĉenilo, kuŝujo, kuŝemulo, laĉo, laŭta, licenciato, marĉaĵo, marĉeto, maŝinaro, morĉelo, muŝo, niĉo, parcelo, parenĉaro, pinĉilo, poŝo, proĉeso, procesema, puŝo riĉaĵo, malriĉulo, riproĉo, ruŝo, sincereco, societo, societema, socialismo, socialajn, suĉilo, suĉado, sufiĉa, sufiĉege, intertuŝiĝo, viciojn, viŝilo, voca, voĉdonado.

§ 10.

Forlasado de la adverba finiĝo e; Sigeloj.

*se* *ne* *de* *ke* *ve* *ĉe* *re* *bone* *zorgeme* *amike*

La adverba finiĝo e estas forlasata, se ne rezultas dusenco.

Prefiksoj kaj Vortoj.

*mi* *vi* *ci* *li* *ŝi* *ĝi* *ni* *ili* *kelk(e)* *kelke* *da*

mi, vi, ci, li, ŝi, ĝi, ni, ili, kelk(e), kelke da

*ek* *kon* *kontraŭ* *kun* *ĉu* *for* *k. t. p.* *ĉi* *ĉi-tio* *ĉi-tion*

ek, kon, kontraŭ, kun, ĉu, for, k. t. p. ĉi, ĉi-tio, ĉi-tion

*tio* *tion* *tiu* *tiun* *tio-ĉi* *tion-ĉi* *tiu-ĉi* *tiun-ĉi* *ĉi-tiu* *ĉi-tiun*

tio, tion, tiu, tiun, tio-ĉi, tion-ĉi, tiu-ĉi, tiun-ĉi, ĉi-tiu, ĉi-tiun

Ekzercaĵo: legu kaj kopiadu:

*mi* *vi* *ci* *li* *ŝi* *ĝi* *ni* *ili* *kelk(e)* *kelke* *da*  
*ek* *kon* *kontraŭ* *kun* *ĉu* *for* *k. t. p.* *ĉi* *ĉi-tio* *ĉi-tion*  
*tio* *tion* *tiu* *tiun* *tio-ĉi* *tion-ĉi* *tiu-ĉi* *tiun-ĉi* *ĉi-tiu* *ĉi-tiun*


**Skribu:** Ĉu vi vidis tion-ĉi? Ne, fraŭlino! Tiu-ĉi libro ne estas bela legaĵo. Li tenadis lin je la kolo per la manoj. Se mi ne helpus al mia amiko, tiu malamiko lin batus. Ili estas el Parizo. En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis ses pafojn. Ni batalas kontraŭ li. El Ĝenevo mi ricevis leterojn. Amike salutas Via Freĉjo! Kun la ĉapelo en la mano ili iris al la voĉdonado. Sen laboro ne venas oro. Eĉ el vulpa felo elvidas azenaj oreloj. En malfeliĉeco koniĝas amikeco. For de l'okuloj, for el la koro. Ĉi tiu ĵurnalo estas favora al nia afero.



# KVARA LECIONO.


## § 11.

### Konsonantkunligoj.



nd st sk kv ks ng ns nk sp ŝp ŝm ŝv  
(kz)


Oftaj konsonantkunligoj havas apartajn simplajn signojn.



Skribu stenografie: rando, ŝtonojn, skizoj, kvar, akso, ekzemo, rango, hanso, dankon, spaco, ŝmaco, ŝvelaĵo, restas, kvankam, aŭskultas, esperas.


## § 12.

### La simboligata t.



nt rt kt pt ft nkt kst ŝt ĥt

Se la konsonanto t sekvas senpere la konsonantojn n, r, k, p, f, nk, ks, aŭ ŝ, ĝi estas markata simbole per pligrandigo de tiuj-ĉi konsonantsignoj; tiel oni ricevas la signojn por nt, rt, kt, pt, ft, nkt, kst kaj ŝt.



Skribu: leganta, estonta, ricevinta, kartoj, efektive, adepto, malofte, sanktojn, eksterordinare, poŝtaj, ŝtonegoj.

## § 13.

### R kaj L post Konsonantoj.



pr bl tr dl kr gl ŝr ŝl nkr, nkl, rl mpr mpl zl ksr

La konsonantoj r kaj l oftege kuniĝas kun aliaj konsonantoj; por faciligi la kuniĝon, la du signoj en tiu-ĉi okazo estas tordataj en la hokon de l'antaŭiranta signo aŭ sur ĝian maldekstran flankon, ĉe antaŭiranta r, sur la supran randon. Samtempe L malgrandiĝas en punkton aŭ punktbuketon.



Skribu: prezo, blinda, trezoro, atlaso, kredado, glavo, ŝranko, ŝlosilo, komprenas, ekzemplojn.

Ce la signoj mpr kaj mpl la P estas ellasata; R kaj L formas laĉeton kun la signo M.

## § 14.

### Sigeloj.



por, sinjoro (s-ron) ankaŭ, ĉirkaŭ, antaŭ, mult(e), multe da, lingvo, kaj, trans





Ekzemploj:

*Handwritten examples of shorthand symbols.*

Skribu: amata, legataj, kreskatan, sendatajn, vendato, malamatoj, komitaton, pruvatojn, (samaj vortoj kun la partcipa finiĝo -it-).

§ 17.

Vortkunmetado.

*Handwritten examples of word combinations: lernolibro, orelingo, libertempo, dusenco, unuvoĉe.*

lernolibro, orelingo, libertempo, dusenco, unuvoĉe

En vortkunmetaĵoj oni dense interligas la vortojn; ĝenerale estas pli bone skribi ĉiun vorton aparte kaj loki la vortojn kunmetotajn proksime unu al la alia.

Legu:

*Handwritten examples of shorthand words: Al, Al, Uol, nes, Uq, sas, Cypel, etc.*

Skribu: dormoĉambro, kamentubo, teretaĝo, akvoglaso, korktirilo, antaŭĉambro, vespermanĝo, terpomojn, poŝhorloĝo, butonfruo, piedvesto, lambastono, pluvombrelo, lernejestro, singardema, samregnano, leĝoscienco, manlaboristo, artefarita, fulmotondro, fervojo, bonodora, sunkuŝiĝo.

§ 18.

Sigeloj.

*Handwritten examples of shorthand symbols.*

nen . . , pli, plej, preskaŭ, sur, sup(e)r, ekz., D-ro

Mallongigoj laŭvolaj:

*Handwritten examples of shorthand symbols.*

Jan, Febr., Esperant-, Stenografi-, t.e., fr., L.I., S.I.R.

Mallongigoj, ofte farataj en la ordinara skribado, ankaŭ estas uzataj per stenografiaj signoj.







## Naskiĝo de l'Sistemo Stolze-Schrey.

En Germanujo ĝis la jaro 1875 kvar stenografiaj sistemoj estis disvastigataj: Gabelsberger'a, Stolze'a maljuna kaj juna kaj Arends'a. En 1876 ĝis 1880 multe da sistemoj naskiĝis inter kiuj la plej gravaj estas Roller'a, Faulmann'a, Lehmann'a (stenotahigrafo). En la jaro 1887 la gabelsbergerano Ferdinando Schrey en Barmen verkis laŭ gabelsbergeraj kaj stolceaj elementoj la „Simpligitan germanan stenografion“, 1888 naskiĝis Brauns'a, pli malfrue Kunovsky'a sistemoj. En Bavarujo, Saksujo, Aŭstrujo gabelsbergera sistemo estis de longe oficiale helpata, cirkonstanco kiu multege faciligis la disvastiĝon de ĉi-tiu sistemo; la aliaj devis batali per propraj penadoj kaj kontraŭ grandegaj malhelpaĵoj por sia ekzistado. Per dekjara disvastiĝo ĝis 1897 junstolcea stenografio ludis regantan rolon en Prusujo kaj Svisujo, gabelsbergera en la tri ŝtatoj supre nomitaj; de la aliaj sistemoj la metodo Schrey akiris la trian rangon. Nun havis la tri sistemoj multajn kontaktpunktojn; iliaj signoj estas partostrekoj de l'ordinaraj literoj, ideo unue efektivigita de Gabelsberger. Li ankaŭ elpensis mallongan klaran simbolan vokalsigniĝon; sed mallongecon de l'sistemo li nur atingis grafikane (skribane) ne tempane.

Grandan kvanton da reguloj li havis pri almetiĝo, malalmetiĝo, dikiĝo de l'signoj kaj formoŝanĝo kaj pri litera skribo de vokaloj. Kontraŭe principo de la stolcea sistemo estis senkondiĉa regularo kaj akurateco; ĝi enhavas regulan vokalsimboliĝon, favoran strukturon de la vortoj rilate al radikoj, prefiksoj kaj sufiksoj; sed kreo de amaso da mallongigoj treege malfaciligis la stolcean sistemon; tamen tiu-ĉi venkis la konkuranton en praktika uzado de la stenografio.

Vidante la malunuecon de la stenografia vivado, kiu malhelpigis la tutan stenografian progresadon, kelkaj kleraj viroj komencis provi la unuigeblecon de la diversaj sistemoj sur la bazo de l' kontaktaj punktoj. Precipe per la sistemo Schrey kiu jam okupadis ĝustan mezon inter Gabelsberger kaj Stolze estis markita la vojo por laŭtempa aliformigo de la stenografisistemoj.

Troviĝis en la stenografia scienco, praktiko kaj instruado kompetentuloj el la Stolze'aj, Schrey'aj kaj Velten'aj sistemanoj; komitato estis formita por unuigo kaj havis dudek du membrojn: bedaŭrinde la gabelsbergeranoj ne partoprenis. Prezidanto de tiu-ĉi komitato estis

la urbkonsilanto Elberfeld'a Dro Adolf Mantzel, kuracisto. Per unujara fervora laborado kaj serĉado oni fiksas la fundamentojn sur kiuj la unuiga sistemo devis esti konstruota. Persona komitata kunveno okazis la 7an ĝis la 9a de Aŭgusto 1897 en Berlino; projekto prezentita de l'prezidanto estis akceptita post 27-hora kunlaborado de la dudek du membroj kaj nur tre malmultaj ŝanĝoj estis farataj. Entuziasmege la membroj de la stenografiaj societoj salutis la feliĉan solvon de l'problemo kaj en malmultaj tagoj kaj semajnoj naskiĝis tre forta konkuranto de Gabelsberger per la sistemo „Stolze-Schrey“. Kelkaj malgrandaj alisistemaj societoj kun la Stolze'aj kaj Schrey'aj akceptis la novan simpligitan praktikan metodon; eĉ kelke da sistemelpensistoj forlasis la propran verkon transirante al la unuigado.

La unuigita sistemo estis akceptita de la Germana komuna milita departemento por instruado en la militaj lernejoj; plie la sistemo Stolze-Schrey estas deviga aŭ almenaŭ laŭvola fako ĉe gimnazioj, liceoj, realaj kaj komercaj institutoj de Germanujo kaj Svisujo; ĝi estas tradukita en francan, italan, hungaran, danan, anglan, rusan, svedan, holandan, japanan, latinan kaj internacian lingvojn. En ŝtataj parlamentoj de Germanujo kaj Svisujo ni trovas Stolze-Schrey'ajn stenografistojn kaj preskaŭ ĉiuj grandaj komercaj firmoj de tiuj landoj praktike uzadas la stenografion per siaj oficistoj. En Svisujo aliaj germanaj sistemoj ekster Stolze-Schrey'a havas nur tre malmultajn adeptojn, tial oni povas diri, Svisujo havas la stenografian unuecon per la sistemo Stolze-Schrey.

Unuigado de la sistemoj formas grandegan progreson por la germanlingva teritorio. Nun ekzistas en Germanujo nur du gravaj sistemoj, kiuj povas konkuri en estonteco. Sed ankaŭ tiuj-ĉi sistemoj, Gabelsberger'a kaj Stolze-Schrey'a havas multe da kontaktpunktoj. Pro tio-ĉi jam ofte precipe en Aŭstraj revuoj la penso estas elparolita, unuigi la du sistemojn por atingi la sistemunuecon kaj malaperigi la longe daŭrintan malutilan interbataladon.

Certe estonta unuiga sistemo treege similiĝos al la nuna Stolze-Schrey'a, ĉar tiu-ĉi jam fariĝis komuna fundamento de simpligado de la Stolze'a, Schrey'a kaj Gabelsberger'a sistemoj. Jam nun pro ĝia simpleco kaj reguleco ni povas ĝin nomi „Esperanto“ inter la stenografisistemoj, ĉar ĝi ne estas tute sendependa kaj novega sistemo, sed kiel Esperanto el la lingvoj, Stolze-Schrey el la diversaj sistemoj elprenis la elementojn interstenografiajn kaj ilin kunigis per simplaj reguloj.

(Stenografii la artikolon „Naskiĝo de l'sistemo Stolze-Schrey“ kaj sendu ĝin al l'aŭtoro de tiu-ĉi libro; korektita ĝi estos resendata ĉe aldono de 1 franko poŝtarke aŭ poŝtmandate.)

# Stenografia perfektigo.

Kiel en ordinara skribo nur post multjara ekzercado ni atingis lertecon, tiel ankaŭ la stenografio postulas senlacaĵan laboremecon. Tial ĉiu tage oni devas legi kaj skribi Esperantajn tekstojn, precipe la legaĵojn de tiu-ĉi libro. Neniam oni skribu tro rapide komence, ĉar nur per zorgema kaj tute korekta belskribado ni atingos skribrapidecon. Ĉiokaze rekomendu la stenografion al Viaj amikoj por havi la eblon interkorespondadi. Kiu eklernas aŭ ellernis la Esperantan Stenografion, sendu sian adreson al la aŭtoro de tiu-ĉi lernolibro (al Sro Fr. Schneeberger, Laufon-Svisa) kaj aliĝu al la „Internacia Esperanta Stenografia Societo“. Per tiu-ĉi aliĝo ĉiu Esperanta stenografisto mem havos tre grandan utilon, plie li helpas ankaŭ vastigi nian belan kaj praktikan arton. Nur per nelaca komuna klopodado la stenografio plenumos sian celon: faciligi la laboron al ĉiu, kiu bezonas rapidan skribon por privata, komerca kaj oficiala uzado.

# PLENA RESUMO

de Esperanta Stenografio (Unuiga sistemo Stolze-Schrey).

Signoj: a. duon- kaj pliaŭtopaj:

r rts z n nt m mpr mpl l v b d nd sk g ĝ ng j j ns ks

b. du- kaj pliaŭtopaj:

p pt sp sp h f ft h ht t st st k kt kv nk nkt kst c ĉ ŝ ŝv ŝm

### Konsonantkunliĝo:

br pl ŝr ŝl tr tl nr rn rg rk ld nz

### Vokaloj kaj vokalsimboliĝo:

e a ia i ie aŭ aj o io u iu ir or ist of ie iŝa

ed ad iad od iod ud iud id ied aŭd ajd

### Sigeloj:

Prefiksoj: bo ek ge mal

Sufiksoj: a, ia aj o, io oj, ojn, iojn, at(a), it(a), ito ite

Vortoj: ankaŭ, ankoraŭ, antaŭ, baldaŭ, ĉi, ĉi-tio, ĉi-tiu, ĉirkaŭ, ĉu, da

en estas-is-os-us, for hav(as) inter kaj kelk(e) kon kontraŭ

k.t.p. kun la, l' lingv mi mult(e) nen.. oni par per

pli plej por preskaŭ sinjor sup(e)r sur tio tiu trans



## ENHAVA RESUMO.

Unua Leciono.		paĝo
§ 1.	Konsonantoj g, b, v, l, m. Vortfinigoj -o, -oj, -a, -aj.	1
§ 2.	Vokaloj e, a, ia (Apudmetado).	1
§ 3.	Vokaloj o, io, u, iu (Malaltmetado).	2
§ 4.	Vokaloj i, ie, aŭ (eŭ), aj (ej), (Altmetado).	3
Dua Leciono.		
§ 5.	Konsonantoj j, ĝ, ĵ, z, n, s, r. Finigoj -ojn, -iojn.	4
§ 6.	Alligado de Silaboj kaj Signoj.	4
§ 7.	Mallongigoj aŭ Sigeloj.	5
Tria Leciono.		
§ 8.	Konsonantoj t, k, p, f, h, ĥ; c, ĉ, ŝ.	7
§ 9.	Altmetigo kaj Malaltmetigo de la signoj c, ĉ, ŝ.	8
§ 10.	Forlasado de la adverba finiĝo e; Sigeloj.	8
Kvara Leciono.		
§ 11.	Konsonantkunligoj.	10
§ 12.	La simboligata t.	10
§ 13.	R kaj L post konsonantoj.	11
§ 14.	Sigeloj.	11
Kvina Leciono.		
§ 15.	Vokalsignoj.	13
§ 16.	Participaj Finigoj.	13
§ 17.	Vortkunmetado.	14
§ 18.	Sigeloj kaj Laŭvolaj Mallongigoj.	15
Legaĵoj.		16
Naskigo de l'Sistemo Stolze-Schrey.		20
Stenografia perfektigo.		22
Plena Resumo.		23

Presejo de Möller & Borel G. m. b. H., Berlin S., Prinzenstr. 95.  
 Aŭtografio de Karl Hasse, oficisto kancelaria, Bern (Svis).  
 Kliŝoj de H. B. Manissadjian, Basel (Svis).

## KOLEKTO ESPERANTA APROBITA

de D<sup>ro</sup> ZAMENHOF.

### GERMANUJO. — ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL,

BERLIN S., Prinzenstrasse 95.

Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache, mit Uebungen, Syntax und Proben aus Poesie und Prosa. Von J. Borel	Mk. 1,20
Schlüssel zu den Uebungen des Vollständigen Lehrbuchs. Von J. Borel	„ 0,50
Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Von D <sup>ro</sup> Zamenhof	„ 2,—
Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Von H. Jürgensen	„ 1,80
Anfangsgründe der Esperanto-Sprache (Auszug aus dem vollständigen Lehrbuch). Von Cart und Jürgensen	„ 0,30
Verkoj internaciaj.	
Ekzercoj de aplikado, leksikologio, sintakso, vortfarado esperantaj, de L. de Beaufront	Mk. 0,90
Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto de D <sup>ro</sup> Zamenhof	„ 2,80
Esperantaj Prozaĵoj „kolekto da tekstoj de plej bonaj aŭtoroj“	„ 2,—
Hamleto, Reĝido de Danujo (Tragedio de Shakespeare), tradukita de D <sup>ro</sup> Zamenhof	„ 1,60
Diversaĵoj. Rakontetoj tradukitaj de Lallemand kaj Beau	„ 1,20
Monadologio de Leibniz, traduko de D <sup>ro</sup> Boirac, rektoro de l'akademio de Dijon	„ 0,50
Komercaj leteroj, de Berthelot kaj Lambert	„ 0,40
Vojaĝo interne de mia ĉambro, de X. de Maistre. Tradukita de S. Meyer	„ 0,70
Elektitaj fabeloj de La Fontaine, esperantigitaj de G. Vaillant	„ 0,70
Advokato Patelin. Triakta proza komedio, de Brueys kaj Palaprat. Tradukita de M.-J. Evrot	„ 0,70
La fundo de l'mizero de V. Sieroševski, tradukita de Kabe	„ 0,70
L'Avarulo, de Molière, tradukita de S. Meyer	„ 0,70
Eneido de Virgilio (kantoj I kaj II), tradukita de D <sup>ro</sup> Vallienne	„ 0,60
Cikado ĉe Formikoj, Unuakta komedio de Labiche kaj Legouvé	„ 0,60
Kondukanto de l'interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio Internacia, ellaboris A. Grabowski	„ 1,70
Pri unu speco de kurbaj linioj koncernantaj la V <sup>an</sup> Eŭklidan postulaton, verkis Profesoro A. Dombrovski	„ 0,50
Lernolibro de Esperanta Stenografio (laŭ sistemo Stolze-Schrey) de F. Schneeberger	„ 0,80

### FRANCUJO. — HACHETTE kaj K<sup>o</sup>

79, boulevard Saint-Germain, PARIS.

1. Grammaire et Exercices de la langue internationale „Esperanto“, par M. L. de Beaufront. Un vol. in-16, br.	Fr. 1,50
1 bis. Corrigé de Grammaire et Exercices de la langue internationale „Esperanto“, par M. L. de Beaufront. Un vol. in-16, br.	„ 0,75
2. Dictionnaire Esperanto-Français, par M. L. de Beaufront. Un vol. in-16, broché	„ 1,50
4. Vocabulaire Français-Esperanto, publié avec des notions de grammaire et un Vocabulaire abrégé Esperanto-Français, par MM. Th. Cart, professeur agrégé de l'Université, M. Merckens et P. Berthelot. Un vol. in-16, br.	„ 2,50
5. Commentaire sur la grammaire Esperanto, par M. L. de Beaufront. Un vol. in-16, br.	„ 2,—
6. L'Esperanto en dix leçons, par Th. Cart et M. Pagnier. Un vol. in-16, broché	„ 0,50
6 bis. Corrigés des Exercices de l'Esperanto en dix leçons, par MM. Th. Cart et M. Procureur. Un vol. in-16, br.	„ 0,50
7. Premières leçons d'Esperanto, par M. Th. Cart. Br. in-16	„ 0,30
8. Texte synthétique des règles, préfixes, suffixes, expressions de l'Esperanto, avec, traduction française en regard, par M. L. de Beaufront. Un vol. in-16, br.	„ 0,50



**ANGLUJO. — „REVIEW of REVIEWS“**

Mowbray House, Norfolk street, LONDON, W. C.

First lessons in Esperanto, by Th. Cart and Joseph Rhodes . . . . .	6 pence
Esperanto: The Student's complete Text-Book, with two vocabularies by J. C. O' Connor B. A . . . . .	1s 6d
Esperanto-English dictionary, by A. Motteau . . . . .	2s 6d
English-Esperanto dictionary, by J. C. O' Connor B. A. . . . .	2s 6d
English-Esperanto dictionary, by Joseph Rhodes and John Ellis ( <i>in preparation</i> ).	
Grammar and exercises of the International Language Esperanto, by Richard H. Geoghegan . . . . .	1s 6d

**ITALUJO. — RAFFAELLO GIUSTI**

53, Via Vittorio Emanuele, LIVORNO

Prime lezioni d'Esperanto de Th. Cart e Alb. Gallois . . . . .	La. 0,40
Grammatica della lingua internazionale Esperanto di L. de Beaufront, tradotta da G. Puccinelli . . . . .	„ 1,50
L'Esperanto in dieci lezioni, di Cart e Gallois . . . . .	„ 0,75

**HISPANUJO. — J. ESPASA**

579, Calle de las Cortes, BARCELONA

Primeras lecciones de Esperanto de Th. Cart y L. Villanueva . . . . .	P. 0,40
Manual y Ejercicios de la lengua internacional Esperanto, por V. Inglada Ors y A. L. Villanueva . . . . .	„ 3,—
Vokabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto de Vallanueva y Inglada . . . . .	„ 6,—

**POLUJO. — M. ARCT**

53, Nowy Swiat, WARSZAWA

Dr <sup>o</sup> L. Zamenhof, Podrecznik jezyka Esperanto . . . . .	R. 0,25
Dr <sup>o</sup> L. Zamenhof, Slownik jezyka Esperanto . . . . .	„ 0,15

**DANUJO. — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN**

KJOBENHAVN

Esperanto-Dansk-Norsk Ordbog, af F. Skeel-Gjörling . . . . .	Kr. 3,50
Grammatik . . . . .	
Dansk-Esperanto Ordbog . . . . .	

**BULGARUJO. — KLUBO „STELO“**

PLOVDIV

Esperanto en 10 lecionoj, de Cart et Pagnier . . . . .	Fr. 1,—
Unuaj lecionoj, de Cart et Atanasov . . . . .	„ 0,40
Propaganda folio . . . . .	„ 0,10

**BELGUJO. — HOLANDUJO.**

A.-J. WITTERYCK-DELPLACE

4, Nouvelle Promenade. BRUGES

Het Esperanto in tien lessen, door A.-J. Witteryck naar Cart et Pagnier	Fr. 0,50
Pagoj el la Flandra literaturo de Seynaeve kaj van Melckebeke . . . . .	„ 1,50

**PORTUGALUJO. — BRAZILUJO.**

Primeiras lições de Esperanto, do professor Th. Cart, trad. portuguesa de A.-C. Coutinho, Paris, Hachette . . . . .	Fr. 0,40
--	----------

Presejo de Möller & Borel G. m. b. H., Berlin S., Prinzenstr. 95.  
Aŭtografio de Karl Hasse, oficisto kancelaria, Bern (Svis.).  
Kliŝoj de H. B. Manissadjian, Basel (Svis.).